# *La ekonomio en la tagordo de la VIII-a kongreso de la komunista partio*

**Logo 8-a kongreso de la komunista partio**

Havano, mar 15 (RHK) La VIII-a kongreso de la komunista partio, kiu sesios inter la 16-a kaj 19-a de aprilo analizos gravajn temojn kiel la ekonomiajn kaj sociajn rezultojn atingitajn dum la anta?a jarkvino, samkiel la anta?vidoj por la venontaj jaroj kun la celo garantii la kontinuecon kaj nerenverseblon de socialismo kaj avanci en la ekonomia evoluo kaj la plibonigo de la vivkvalito de la lo?antaro en stre?a ligo kun la necesa formado de valoroj etikaj kaj politikaj en la civitaneco.

Dum preska? unu jaro, komisiono de reprezentantoj de la partio, la registaro, la konstanta komisiono por starigo kaj evoluo, la amasaj organizoj, akademianoj kaj esploristoj, laboris intense en la ellaborado de la dokumentoj analizotaj de la kongresaj delegitoj, kio inkluzivas kvin bazajn aspektojn.

Mallonga resumo de la ekonomio dum la jarkvino 2016-2020; integrala pritakso de la ekonomia modelo ekde la sesa kongreso ?is nun; gvidlinioj kaj politikoj; aktualigo de la konceptigo pri la socia kaj ekonomia modelo; nacia plano de evoluo sociekonomia ?is 2030; aktualigo de la gvidlinioj por la venonta periodo.

Tiuj ?i temoj markos la analizon pri ?io farita kaj la defioj en la sociekonomia dimensio ekde la sesa kongreso de la partio.

fonto: Granma

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/250663-la-ekonomio-en-la-tagordo-de-la-viii-a-kongreso-de-la-komunista-partio

**Radio Habana Cuba**